Frequency has its place alongside intensity when it comes to impressing Esperanto on one's memory. Few American students of Esperanto can have a lengthy enough exposure to Esperanto to acquire fluency. That is why every American Esperantist should at one time at least invest in the experience of a two-month binge of Esperanto, combining the courses at SFSU with participation in the American and world conferences and perhaps a week or two of a Lucy Harmon tour visiting foreign Esperantists.

Acquiring Esperanto is not likely to happen until a student is working on at least the intermediate level. But once such a student participates in the SFSU courses and world congresses, there is every chance that he or she will fill up an Esperanto room in the permanent memory with a stock of skills, there to be reactivated whenever the right time comes.

MALFIDINDA STATISTIKADO EN ESPERANTUJO

De Bernard Golden

[La jenan artikolon proponas d-ro Bernard Golden, membro de la Akademio de Esperanto, responde al kelkaj komentoj de la redaktoro en la numero de januaro-februaro 1988. Pro la generala intereso de la temo, mi enmetas la tutan artikolon...kompreneble, kun kelkaj postaj komentoj de tiu mencita redaktoro. —Red.]

En la ĉefartikolo de la januara-februara numero de *ELNA Newsletter* (1988), la redaktoro fieras raportas kelkajn statistikajn donitaĵojn pri la kresko de membroj de UEA kaj tiurilate demandas: "Ĉu nova erao komenciĝas por Esperanto?" Mi tuj respondas: "Ne!" Neniu konsekvenca konkludo estas tirebla surbaze de ciferoj pri membreco en internaciaj aŭ lokaj Esperanto-organizaĵoj, ĝuste pro tio, ke la informado venas de la organizaĵoj mem kaj ne estis kontrolita (ĉu ni diru ankaŭ kontrolebla?) de senpartia espriro. Laŭ kelkaj fontoj Mark Twain

eldiris jenan aforismon gravedan je vero: "Statistikoj ne mensugas sed mensogas statistikoj statistikas". La brita politikisto Benjamin Disraeli iom alimaniere vortigis la saman koncepton: "Estas tri specoj de mensogoj: mensogoj, malbenitaj mensogoj, kaj statistikoj." Tiu ĉi du citajoj devas pensigi ĉiun esperantiston, kiu legas aŭ citas statistikajn donitaĵojn de verdlingvaj fontoj.

Redaktoro Harlow opinias kuraĝiga raporton el Ĉinio, ke en certa universitato dufoje formiĝis kursoj kun proksimume po 70 lernantoj. Nu, 70 estas relativa kvanto; en Irano venas sciigoj, ke 170 kursanoj ariĝas por baza instruado en Esperanto. Kion signifas tio? Nenio! Nudaj ciferoj estas krudaj; ili bezonas interpreton. La plej grava statistika informero, kiu bedaŭrinde ĉiam mankas en la tro optimismaj raportoj, estas ne la nombro de eklerntoj sed la nombro de kursfinintoj, kiuj sukcese alproprigis la rudimentojn de Esperanto kaj faris la

sekvajn paĝojn por plurstudi kaj perfektigi sian lingvoscion. Estus tre interese ekscii, ĉu nun ekzistas en la mencita ĉina universitato duagrada kurso, kaj kiom el la 70-kelkaj burĝonintaj esperantistoj nun ekfloras en ĝi. Ĉu entute sepdek? Ĉu eble dek sep? Aŭ ĉu nur sep? [Pri datriga kurso mi ne povas diri. La nombro da kursfinintoj en la mencitaj kursoj estis, laŭ mia komprendo, inter 40-50; la ceteraj 20-30 provizore rezignis pro manko de sidlokoj en la plenplena ĉambro... -red.]

La sama tro facilanima uzo kaj misuzo de statistikoj estas karakteriza de t.n. oficialaj informoj pri la nombro de esperantistoj en internaciaj kaj landaj organizacioj. Naivuloj ne komprenas, ke tiaj nombroj, venantaj de la organizacioj, mem havas neniu valoron por objektiva analizo, ĉar ĉiam dum la historio de Esperanto, ekzistis tendenco falsi informoj pri la disvastiĝo de Esperanto

Continued on page 8

Statistikado from previous page

kaj troigi la pretendojn kaj atingojn de la movado. La ĉefa tubero en la afero estas la manko de unuanime akceptita difino de la nocio "esperantisto". Rezulte de la svaga uzo de la vorto, propagandistoj jetas en la saman verdan korbon ĉiu ulon, kiu portas verdan stelon kaj ankaŭ tiujn, kiuj ne portas ĝin. Ekzemple, *ELNA Update* (2/1988) senkritike raportas, ke Hungara Esperanto-Asocio havas pli ol 7000 membrojn. Jen la faktoj. Fine de la Jubilea Jaro (1987) HEA havis 7118 membrojn en 3 kategorioj: 2671 plenrajtaj membroj, 1731 lernanto-membroj, 2716 simpatiantoj. Veraj esperantistoj troviĝas nur en la unua kategorio, sed ne eblas scii, kiomgrade tiuj homoj bone

“ EKZISTAS TENDENCO FALSI INFORMOJN PRI ESPERANTO KAJ TROIGI LA PRETENDOJN KAJ ATINGOJN DE LA MOVADO. ”

regas kaj uzas la lingvon. La dua grupo, lernanto-membroj, estas tre malstabila, ĉar ĝia konsisto ŝanĝigas ĉiuare okaze de la starigo de novaj kursoj. La tria kategorio, la simpatiantoj, estas, paradokse, pli granda ol la unua! La oficiala raporto pri Esperanto en Hungario en 1987 malkaŝas, ke la nombro de organizitaj anoj ne kreskas kontentige. Ĉiuare tiom da ili forlasas HEA kion aliĝas. Stagnado!!!

S-ro Harlow, komentante pri la membraro de UEA, asertas, ke la nombro inter 40.000 kaj 50.000 ne estas troigitaj. Sed precize kion signifas tiuj ciferoj por la vera monda uzado de Esperanto, se la organizajo eĉ ne postulas bazan scion de

Esperanto por fariĝi membro? Skeptika fakulo pri sociolingvistiko ekscias nur, kiom da homoj apartenas al diversaj membro-kategorioj de UEA sed nenion pri la lingvonivelon de la anoj.

La statistikoj prezentitaj de membro-organizoj ne akordas kun la multe pli altaj taksoj de la nombro de esperantistoj, kiu inkludas ankaŭ tiujn, kiuj ne estas en la organizita movado. Sed ĝuste tiuj ĉi ne estas facile nombreblaj. Antaŭ duonjarcento ĉinaj esperantistoj provis malkovri la veran situacion en sia lando, t.e. ne nur kom da verdsteluloj ekzistas sed ankaŭ je kiu nivelo staras ilia primastrado de la lingvo.

La sekva proksimuma statistiko estis publikigita en *Kantona Esperanto-Gazeto* en 1934.

1. Adeptoj pli ol 300.000
2. Finis kurson pli ol 30.000
3. Skribas kaj parolas malpli ol 3000
4. Korektas skribas kaj parolas malpli ol 300
5. Verkas aŭ tradukas malpli ol 30

Granda merito de la ĉina sistemo estas, ke ĝi differencigas la verdverdajn esperantistojn (parolantojn kaj uzantojn de la lingvo) disde aro da verdete grizaj esperantanoj (laŭ *Plena Ilustrita Vortaro*, neaktivaj aprobantoj de Esperanto).

Neniu vere scias, kiom da "esperantistoj" estas en la mondo hodiaŭ. Ĉiu statistikoj estas falsaj, ĉar ili ne baziĝas sur science organizitaj esploroj. Manke de tia rigora poplonombra metodologio, la revuo *Esperanto* invititis siajn legantojn partopreni en konkurso por diveni nombron! Nur 56 respondej estis ricevitaj, kun taksoj de 40.000 ĝis 40.000.000. La redakcio de Esperanto decidis akcepti la mezan ciferon (la averaĝon de la 23a kaj 24a taksoj), kiu estas 2.000.000.

Ni nun apliki al tiu "oficiala" statistiko de UEA la interpreton laŭ la ĉina metodo.

1. Adeptoj: 2.000.000
2. Kursfinitoj: 200.000
3. Skribantoj kaj parolantoj: 20.000
4. Bonaj skribantoj kaj parolantoj: 2.000
5. Verkantoj kaj tradukantoj: 200

Mi defias legantojn de *ELNA Newsletter* refuti tiun analizon per nekontesteblaj faktoj.

...RESPONDE

1


[Pri la manko de bonaj statistikoj rilate la nombron de esperantistoj en la mondo, ĉiu scias; ni disponas nek pri la financaj rimedoj nek pri la politika kapablo fari tutmondan nombrardon de esperantistoj. Tio estas bedatuirinda sed neignorebla faktro.]

2

[D-ro Golden sugestas, ke la statistikoj provizataj de Esperanto-organizoj estas nekontroleblaj, do almenau foje falsaj. Pri la ELNA membronombro, mi certas, el mia propra laboro en la C.O., ke la statistikoj estas ĝustaj; kaj mi havas nenian kialon por dubi la honestecon de la laborantoj ĉe UEA (UEA membronombro en 1987 estis fine 43.682). Pri HEA, d-ro Golden diras, ke veraj esperantistoj apartenas al la unue mencitita kategorio; sed kiel oni povas certigi, ke veraj esperantistoj ne aliĝas al la tria kategorio, por profiti el eventuale pli malaltaj kotizoj? (Guste tial mi mem ne ŝatas lafoje proponitan ideon starigi en ELNA iun malmultekostan kategorion "Amikoj de Esperanto".)]

3

[Pri la "ĉina analiz-metodo" de d-ro Golden: nekontesteblaj faktoj ne necesas por refuti nepravigebalan analizmetodon. La originala analizo konsistas el starigo de simpla geometria progreso, sen pravigo, tute apriore; tio ne estas statistika analizo, nur fantaziado. Ĉu ĝi estas pli aplikebla al antaŭmilita Ĉinio ol al la nuna situacio, tion mi efektive dubas.]



LETTERS

[Barbara Colt respondas al la demando pri uzo de po-kun akuzativo, kiun mi levis en respondo al letero de Doug Portmann.]

Pri la kazo kun po-esprimo (ankaŭ ĝis, cirkau, inter, kaj super):

Sajnas al mi, ke vere la prepozicio en tiaj esprimoj rilatas nur al la numeralo kaj ne al la substantivo. Kion ili manĝis? Ili manĝis kukojn. Kiom da kukoj ili manĝis? Ili manĝis po du. Ili manĝis kukojn po du. Ili manĝis po du kukoj(n)? (?) Mia lingva sento forte inklinas al la akuzativo, sed mi kredas ke la tempo ankoraŭ ne venas kiam ni povas diri, ke unu el la du esprimoj estas la sole ĝusta.

Barbara Colt

[En sia longa letero Barbara apogas sian lingvan senton sur para. 87 de la Plena Analiza Gramatiko, kiun ankaŭ vi legu; sed si ankaŭ mencias citajojn el la Lingvaj Respondoj de Zamenhof kaj la Laŭokazaj Lingvaj Notoj de Venture por indiki, ke ankaŭ la nominativistoj havas siajn ĉampionojn.]

[Por lingvo-frandemuloj, jen alia demando pri la akuzativo. Ĉu uzindas/uzeblas la akuzativo post anstataŭ kaj krom? Nome, ĉu necesas distigi inter Mi vidis lin anstataŭ ŝi (ne ŝi, sed mi, vidis lin) kaj Mi vidis lin anstataŭ ŝin (Mi vidis ne lin sed ŝin)? Se jes, kiel oni povas pravigi tion, ne samtempelezante la dekses regulojn?]

[Charlotte Kohrs is the driving force behind the organization CHILDREN AROUND THE WORLD.]

You asked to write an article on IN-FANOJ CIRKAU LA MONDO. I will—as soon as I get a chance to breathe. We were funded for launching advertising and producing the song cassette by La Eduka Fondajo "Carson," but are running out of cash because of the 151 responses [to an ad in the October issue of Esperanto] as of 2/8/89. We're about to launch a fund-raising letter.

You ask for comments on the ELNA NEWSLETTER. It is just what we want and need. It's super! I especially enjoy your editorials, the "Newsbriefs," "Regional Reports," "UEA Aktuale," "Letters," "Recenze," and the special articles

such as Derek Roff's inspiring article about Esperanto and SFSU and Cathy's "The S.F. State Story."

When we get our second Children's Journal out I'll send you quotes from remarkable letters we've received.

Charlotte Kohrs

[If you are interested in supporting INFANOJ CIRKAU LA MONDO, their address is 3876 Belmont Ave., San Diego, CA 92116.]

[June Knudsen Fritz skribas pri la nova Nebraska Internacia-lingva Asocio.]

NIA organiziĝas tre bone. Vidu la artikolon en la Daily Nebraskan. Tiu artikolo allogis kvar studentojn al la NIA Esperanta klaso. La klaso havas nauavidulojn, kvin el ili estas NIA-membroj.

NIA mem havas 10 individuojn kaj 4 familiajn aliĝilojn. Mi pensas, ke la publikigado dum la centjarfesto de Esperanto estas la ĉefa kaŭzo de la nuna kreskado en Nebraska. Nur unu junu viro kiu aliĝis al la NIA klaso ne sciis ion ajn pri Esperanto antaŭ ol li legis la artikolon en la Daily Nebraskan.

Mi havas unu sugeston. Ĉu eble ni havos konkurson de artikoloj, verkitaj pri lokaj Esperanto-aferoj, kaj la verkisto devas uzi la bazan vortliston? Jes, mi opinias, ke plua uzo de Esperanto en la novajletero estas bezonata.

June Knudsen Fritz

[Certe, ĉiu volas sci pri lokaj Esperanto-aferoj. Mi omi timas pri konkursoj, ĉar mi mem ne scipovus ĵugi pri ili; sed mi pripensos la aferon. Dumtempe, ne hezitu sendi tiajn artikolojn, kiajn pri-skribas s-ino Fritz.]

[S. Clark Pyfer is a long-time Esperantist, and past trustee of Kiwanis Intl.]

You are doing a great job on the Newsletter! The balance of English and Esperanto is just right for stimulating additional interest in Esperanto. We should share it with as many non-members as possible. You might consider including some of the excellent parallel (Esperanto/English) articles from Redaktisto Derek Roff's "Rapporto" for Esperanto—Grupo Intermontara. His December 1988

issue on Esperantistaj Tostmastroj is particularly good.

Montana is making remarkable progress through the inspiration of Nels Nelson of Bozeman. We are particularly thrilled with the progress in our neighbor state of Idaho, inspired by David Barron's enthusiasm.

S. Clark Pyfer

[It all comes down to a matter of space. I would be glad to use some of Derek's articles (see the September-October issue for 1988), but if possible prefer original material. There are, however, several local bulletins that would certainly be worth reading for those willing to shell out a few extra dollars a year for membership in the organizations that publish them, and the EGI newsletter, edited by Derek Roff, is one of these. Those interested will find EGI's address in the list of local contacts.]

[Marcel Schwenter tamen opinias, ke devos esti pli da Esperanto en nia revuo.]

Mi plejparte ĝuas la kolumnojn Letters, Revional Report, kaj Volas Korespondi, kaj, kompreneble, vian Editorial pagon.

Tamen vi tro multe uzas la anglan lingvon. Mi plie ĝuas la novajleteron se vi plie uzus la Esperantan.

Mi opinias, ke almenaŭ tri kvaronoj de la novajletero devas esti en Esperanto. Espere tio okazos baldaŭ.

Marcel Schwenter

[Mi ankaŭ esperas, ke en la estonteco vi vidos plian Esperanton en la novajletero.]

[From Emil Volcheck: Bernard Golden's Pan-American Esperanto Magazine.]

I'd subscribe if the magazine were no more than \$40/yr., especially if it were slick and glossy. I'd like to hear about Esperanto outside of the U.S., and a magazine for the Americas is close enough to home to make it worth the money. It could improve North-South relations.

Emil Volcheck

[See the answer to Chuck Mays' letter in the last issue.]

RECENZE

Fettes, Mark (red.): *Jubileo: Jarcento de Esperanto*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1988. 162 p. JUB001. \$27

Mi unue aliĝis al UEA en 1959, kiu koincide estis la unua Jubileo—la Zamenhof-jaro, la centa datreveno de la naskiĝo de la kreinto de Esperanto. En 1960 UEA eldonis la Memorlibron pri la Zamenhof-Jaro, grandformatan, binditan, blankan libron kun iom pli ol cent paĝoj. Nun venis la dua jubileo de la lingvo, kaj post ĝi aperis simila memorlibro, ne tiel granda kaj impona, tamen tute ĝisdata kaj interesa. Eble valorus iom da komparo inter la du libroj.

En la unua libro troviĝis eble pli multaj artikoloj, verkitaj de nomoj tiam bone konataj; estas interese, ke el tiuj artikoloj nur unu dum la paso de jaroj fariĝis klasika ("La Internacia Lingvo kiel Belarta Tradukilo" de William Auld), kvankam multaj aliaj restas legindaj. El la listo de verkintoj, kelkaj travis la intertempajn 28 jarojn por aperi ankaŭ en la nuna libro: Auld (per tre longa kaj impona poemo, kiu unue aperis en la revuo Esperanto, sed prese tiom fuŝita, ke ĝi estis nelegbla), Gaston Waringhien, Ivo Lapenna, Juan Regulo; aliaj en la nova libro estas ankaŭ, laŭ la normo de 1959, tute novaj homoj. Azion reprezentas du homoj, kontraŭe al unu en la pli frua libro (Probal Dašgupto, Zhang Qicheng anstataŭ Seiho Nishi); kaj Sovetunio reprezentas novulo, Aleksander Duličenko, anstataŭ la lamentata Eugenio Bokarev.

En ambaŭ verkoj, la artikoloj estas klasigitaj sub diversaj rubrikoj. En la pli frua libro, tamen, la bildoj estis apartigitaj de la teksto, do estis malpli konsekvencaj laŭ ordo; en la nuna libro, la bildoj estis dissemitaj tra la teksto, kaj bone rilatas al la sekcioj, kie ili troviĝas.

En la nuna libro estas kvin sekcioj: Enkonduke; La Jubileo Ekstere, pri informado; La 72-a Universala Kongreso de Esperanto, pri la Jubilea Kongreso en Varsovio; Kultura Jubileo, mikspoto de diversajoj pri Esperanto, kun apartaj informoj pri la kultura semajno en Zagreb, la lingvistika konferenco en Vieno, eĉ la preskaŭ konkurenca konferenco en Graz; kaj Poste. La sekciojn unuan, trian, kvaran kaj kvinan garnas poemoj de Auld

(la jam mencita), Edwin de Kock, Baldur Ragnarsson, Mauro Nervi.

Ankaŭ menciienda estas komparo inter la Internaciaj Patronaj Komitatoj por la du Jaroj. En 1959 estis du paĝoj de malgrande presitaj nomoj kaj titoloj; en la nuna komitato listiĝis nur 30 nomoj. Unu nomo, laŭ mia supra kontrolo, aperis sur ambaŭ listoj: J. Cyrankiewicz, iama ĉefministro de Pollando. Sur la nuna listo estas du ŝtatestroj, Reĝo Juan Carlos de Hispanio kaj Prezidento Vigdís Finnbogadottir de Islando; sur la antaŭa estis nur Prezidanto Juscelino Kubitschek de Brazilo. Mi ne scias, kial oni ne varbis aliajn—ĉu temas pri maldiligento flanke de UEA, ĉu simple pri la fakteto, ke UEA nuntempe sentas sin sufiĉe forta por starigi sen apogo de gravaj nomoj. Mi iomete bedaŭras la foreston de Francois Mitterand, kiu laudire montris sian subtenon por Esperanto, kiam li estis simpla deputito en la franca parlamento.

Pri la enhavo mem de Jubileo: preskaŭ ĉio estas leginda, kaj granda parto estas jam legitima, ĉar tiuj artikoloj aperis en la revuo Esperanto dum la jaro mem. Tamen, relegadon certe meritas "Kaj tamen ni ĝin atingis!" de Waringhien, kiu atentigas pri la graveco por la ĝisnunaj sukcesoj de Esperanto, unue de la kontinueco de la lingvo (memdisciplino kontraŭ reformomanio), due de la "interna ideo", kiun eksteruloj tiom ofte priridas, sed kiu kunligas ne nur la menojojn sed ankaŭ la korojn de la esperantistoj.

Ankaŭ interesa estas "La diplomatoj kaj Esperanto" de Ralph Harry (artikolo bedaŭrinde disfrakasita per kvar paĝoj da fotoj); oni devus legi tiun lige kun artikolo de Osmo Buller pri la spertoj de la iama finna ambasadoro al Japanio, G. J. Ramstedt, kiu aperis en *Esperanto* en novembro, 1988.

Pri la ŝancoj de Esperanto en la t.n. Tria Mondo, vidu la optimisman, tamen avertan, artikolon de Probal Dašgupto "Per nova unueco-principo antaŭen en la Tria Mondo". Sovetia lingvisto Aleksander Duličenko argumentas en aparta artikolo, ke "Cent jaroj provizis unikan modelon por la ĝeneralaj lingvistiko" per Esperanto, kies estiĝo kaj evoluado, malsame ol aliaj lingvoj, kuŝas videbla sub socia mikroskopo, por tiel diri.

Por tiuj, kiuj havas intereson pri libroj, kuraĝiga estas la konstato de Vilmos Benczik (p. 119), ke

ni bone scias, ke en la pioniraj jardekoj—praktike ĝis la dua mondmilito—Esperantaj beletraĵoj vendiĝis en kelkaj centoj da ekzempleroj. "Stafeto" en la kvindedaj jaroj eldonis siajn librojn en mil ekzempleroj. Kompare al tio povas efiki esperige kelkaj aktualaj ciferoj: *Baza Literatura Krestomatio* dum 7 jaroj vendiĝis en 7 mil ekzempleroj, la originala romano *Etilalia* de Lorjak dum tri jaroj travis 3500 acetantojn, Istvan Nemere per *Febro* povis instigi same dum tri jaroj 2600 esperantistojn malfermi la monujon...

En la kvara sekcio, ĝenerale aperis tute novaj artikoloj; menciienda estas la inaŭgura (kaj, kiel poste evidentiĝis, adiaŭa) parolado de Prof. d-ro Ivo Lapenna en Graz:

...mi diru, ke el la multaj salutoj, kiujn ni ricevis, pleje ĝoigis min la salutoj de Universala Esperanto-Asocio kaj de Sennacieca Asocio Tutmonda. ... La letero, kiun S-ro Fettes, la nuna redaktoro de la revuo *Esperanto*—mi aparte salutas lin ĉi tie—tralegis al ni, estas konforma al [mia] propono... Esperable vi konsentos, ke de tiu ĉi Konferenco ni sendu reciprokajn salutojn al la Universala Kongreso de UEA en Varsovio kaj al la Jubilea Kongreso de SAT en Bulonjo-ĉe-Maro.

Iom nekontentiga estas la fina artikolo de d-ro Detlev Blanke. Konstatinte, ke "La kaŭzoj de la relativa sukceso de Esperanto estas ... aparte nelingvaj, lingvopolitikaj faktoroj, ĉar la lingvo estas multe pli ol strukturo, nome socia fenomeno...", d-ro Blanke dediĉas la ceteron de artikolo ĝuste al la demando de preskribo de la lingva strukturo en la estonteco, kaj tute ne plu mencias la neceson plibonigi nian aliron al tiuj nelingvaj faktoroj.

Interesa kaj valoras libro, aparte por tiuj, kiuj volas havi ian registraĵon pri la stato de la movado okaze de la 100-a jaro.

—Don Harlow

LA ŜTONA ZONO

De Aleksander Korjenkov

Ekde la glaciaj bordoj de l' Arkta oceano ĝis la sun-plenaj stepoj kazafiaj etendigas ĉeno da montoj disiganta Eŭropo disde Azio—Uralo. Cetere, en la pratjurka lingvo Uralo signifas "zono", kaj la Ŝtona Zono enhavas pli ol unu juvelon; estas la plej riĉa trezorejo en la mondo. La uralaj gemoj, fero, oro kaj aliaj mineraloj premisis fruan industriigon de la areo. Nun oni konsideras Uralo ne nur la stretan rubandon montaran, sed la tutan korpon, kiun ĝi zonas, nome: Baškiria kaj Udmurtia aŭtonomaj respublikoj kaj kelkaj regionoj de la Rusa federacio. Ĉi tie loĝas pli ol 20 milionoj da diversnacianoj—rusoj, tataroj, baškiroj, udmurtoj, komioj k.a.

Ankaŭ ĉi tien venis la semoj de la zamenhofa idiomu kaj kelkloke trovis fekundan grundon inter la ŝtonegoj. Ni memoru, ke esperantistoj aperis en Uralo jam en 1887, tamen nun ni ne fosu la historion (tion diligente faras nia histori-esplora komisiono), sed ni rigardu la aktualan fizionomion de la urala esperantista vivo.

Tiu vivo ne facilas, ĉar ĝis nun en la post-stalina periodo ne malmultaj aŭtoritatoj eĉ aŭdi ne deziras pri la "danĝera lingvo". Feliĉe, en Uralo tiuj stalinidoj ne multas, tamen ja estas. Ni ne forgesu ankaŭ pri nepagipoveco, apenaŭ eblo kaj ŝanco de veturoj eksterlandaj kaj de renkonto kun "viva"eksterlandano en la fermita Uralo. Tamen la esperantistoj ekzistas. Eĉ en tiaj kondiĉoj ili arangas prelegojn, kursojn, literaturajn vesperojn, planlingvistikajn seminariojn

kaj kulturajn semajnfinojn, fondas klubojn kaj rondetojn, legas, verkas, tradukas...

Evidente oni devas akcepti, ke Esperanto povas funkcii (kaj funkcias, ne nur en Rusio, sed ankaŭ en Ĉinio kaj Vjetnamio) kadre de unilingva komunumo, kie ĝi ne primare rolas kiel interlingva komunikilo sed jen kiel arta (sin)esprimilo, jen kiel rimedo gaje pasigi liberan tempon. Tamen ĝi sendube estas ankaŭ fenestro en la mondon, mondon foran kaj apenaŭ imageblan: ja oni korespondas (malgraŭ la neadekvata poŝta servo) kaj legas, abonas al (ve, malmultaj) periodaĵoj kaj ... revas, jes ankaŭ revas pri la tempo, kiam oni uzos Esperanton laŭ la rekta "celo".

Eble ankaŭ pro tiuj baroj kaj obstakloj en Uralo forte senteblas kolektiveco de la agado, precipue en la kampoj klerisma kaj faka; nur kolektive eblas rezisti tiun kolossaln burokratan sistemon, kiu daŭrigas funkcii malgraŭ la slogan deklaritaj perestroko kaj glasnosto. Tre belaj voroj, se post ili estus agoj.

Do, ne mirindas, ke la plej populara estas ĝuste la Kolektiva esperanta biblioteko (KEB), en Sverdlovsk, sub la direkto de Halina Gorecka. Fondita antaŭ ses jaroj, ĝi nun ampleksas pli ol 800 volumojn (modesta nombro, sed ja en Nepagipovujo). Ne malofte venas en la Bibliotekon Nikolaj Lozgaĉev, talenta poeto kaj literaturisto el Permo, ne-lastvica gitaristo, la animo de la amatoraj koncertoj. Vizitas KEB-on ankaŭ la sarkasma felietonisto el Jalutorovsk, kies

satira romaneto "Ljusjka Benc" fariĝis laŭreato de la legantara referendo de la kulta almanako "Sezonoj". Cetere, tiu modesta multobligajo kun mizera eldonkvanto akiras firman reputacion eksterurale, samkiel la informilo "Ekzakte", kiun redaktas la prezidinto de la Urala esperantista komitato Aleksandr Zagvazdin.

Kial prezidinto? Tutsimple, UEK ne plu ekzistas depost la 18a de decembro 1988, kiam estis fondita la Urala esperantista societo—libervola unuiĝo al kiu povas aparteni iu ajn persono (ne nepre uralano, ne nepre e-isto), kiun interesas komuna agado por progresigo de Esperanto kaj vastigo de aplikado de la lingvo. La nova Societo daŭrigos la klerisman tradicion de UEK kaj suplementos ĝin per novaj aktivadoj, i.a.:

- eldonado de ruslingva informilo "Fakto";
- establa de kluboj kaj rondetoj en novaj urboj;
- informado pri Esperanto inter la studentoj de universitatoj kaj pedagogiaj institutoj, kie estas formataj instruistoj;
- esploro de la historio de la stalinaj persekutoj kontraŭ esperantistoj.

La Societo pretas kunlabori kun ĉiuj (sendependaj) esperantistaj organizaĵoj. Interalie, nun en Sovetio krom la oficiala ASE laboras kvar pliaj organizaĵoj—en Estonio, Latvio, Litovio kaj Uralo. Viajn proponojn pri kunlaboro adresu al la sekretario: SU-620077 SVERDLOVSK 77, ab.ja. 67, UES, Ilsia Novikova.

MI SKRIBAS LETERON

Post penso alvenas decido
Al skribo kaj serĉo jen jen
En pozo aŭ ie por plumo
Kun inko sufiĉa plen plen.

Nu, kion mi skribus paperen?
Vi bone sanemas ĉu ne?
Mi lunde esploris kavernen
Profunda raporto jes tre!

Hieraŭ pafema pluvego
Tremidis min trae kaj tra
Hodiaŭ alvenas mildeco
Kaj birdoj triladas tra la.

Sunvarmo invadas la korton
Abeloj laboras kaj kun
Multflugoj kolektas nektaron
Tra tutu la tago zum zum.

Diantoj dissendas parfumon
Ravantan la sentojn do se
La pensoj forflosas en revon
Ĉu oni bedaŭrus?—ho ne!

Ĉenokte mil grilioj kantadas
kunkune susure lu lu
Du strigoj en bosko ululas
Mil voĉoj muzikas kun du.

Ne ĉiam la loka vetero
Paradas serene ĉe nun
La vento dum vintra vizito
Bategas la domon—ka BUM!

Najbaro reportas fantomon
Hantantan la domon de li
Kaj povas eĉ ludi pianon
Mi dubas pri tio—ĉu vi?

Koverto poštmarko adreso
Korsento enmete kun ĝi
Adiaŭ letero bonvojo
Al kara amiko de mi.

Adrian Hughes

Esperanto League for North America, Inc.
P.O. Box 1129
El Cerrito, CA, 94530
Usono/USA

Nonprofit Organization
U.S. POSTAGE
PAID
Berkeley, CA
Permit No. 330

NEWS—PLEASE EXPEDITE

Address Correction Requested
Return Postage Guaranteed

VISIT WITH AN ESPERANTIST IN CUBA

By James and Nora Werner

[San Diego Esperantists James and Nora Werner recently returned from another North American country, which is—paradoxically—one of our nearest neighbors and one of the countries philosophically most distant from us in the world today.]

While on a two-week trip to Cuba in January we had the good fortune to meet twice with James's Esperanto pen pal, Orlando Raola Gonzalez in Havana. Though Orlando knew we were coming in January, it took many days for us to actually make contact because he was not staying at his usual address, he did not have a telephone, and our hotel had our name incorrectly listed so that when he phoned he was told that we were not registered! He finally reached us by insisting that the hotel let him talk with any members of our group registered at the hotel.

Our first meeting was with Orlando and his gracious wife Elsa in the dining room of our hotel, the Presidente. The visit went so well that a few days later we were invited to their home, where we met Elsa's parents and her sister and husband, as well as Orlando and Elsa's bouncing two-year-old, Abel. Orlando is a chemist, who also received a law degree from the University of Havana, and Elsa is a metallurgical engineer in the field of powdered metals. Every Sunday Orlando has a broadcast on Radio Havana in and about Esperanto. The broadcast lasts 20 minutes now, soon to go to half an hour, and he has hopes of eventually getting a full hour.

From Orlando we learned that the Cuban Esperanto Association, like other private voluntary organizations, has a state partner through which it deals with organizations outside of Cuba. Without such a partner it would not be able to order things from abroad or pay for them with non-Cuban currency. The present state partner is the Ministry of Culture. From 1979 to 1987 the partner was the Academy of Sciences, but Orlando feels the relationship with the Ministry of Culture has been very amicable and productive, facilitating the publication of Esperanto books by the Jose Marti publishing house. Unfortunately, our busy schedule kept us from making a visit to the office of the Esperanto Association on Calle Neptuno in old Havana.

The Cuban Esperanto Association has active relationships with the national associations of

Mexico, Brazil, Hungary, Bulgaria, German Democratic Republic, and other Latin American countries, resulting in exchanges of books and teachers. The Cuban Association likes to think of itself as the big brother of the other Latin American associations since it has in recent years "exploded" into renewed activity, in what Orlando calls "the Cuban way." Most of the other Latin American associations are poorer than Cuba's and can benefit from its work relative to Radio Havana and Cubatour, the national tourist agency.

Orlando says that the Cuban Esperanto Association plans to publish more than twenty new books through the Jose Marti publishing house before the Universala Kongreso de Esperanto in Havana on July 14, 1990. And if his enthusiasm and energy are typical of other Esperantists in Cuba, we have no doubt that they will fulfill those plans. Orlando is a dedicated and most impressive booster of Esperanto, which augurs well for the 1990 Congress. He would love to attend the San Francisco State Summer Workshop, either as student or teacher, but he would have to have financial help from outside Cuba to do so. Anyone wishing to lend a hand can write to him at Longa 200, apt. 5, Man tilla, 13800, La Habana, Cuba.

Regarding attendance of U.S. Esperantists at the 1990 Congress in Cuba, there are governmental complications on the American side. Treasury regulations prevent Americans from traveling to Cuba, with certain exceptions for news media and professional researchers. So if you want American Esperantists to be able to attend the 1990 Congress, you might want to write to the President and the Secretary of State to plead for an exception for those who want to attend that meeting. After all, it is going to look rather silly if the only North Americans who attend the 74th UK are from Canada and Mexico, both of whom allow normal tourism to Cuba! Shouldn't a gentler, kinder America allow its citizens to visit Cuba?

We are two American citizens who enjoyed their Cuba experience and feel we came home the richer for it.



President: Ken Thomson (1990)

Vice President: Dr. Duncan Charters (1990)

Secretary: Virginia Stewart (1989)

Treasurer: John B. Massey (1991)

Other Board Members: Dr. Ronald Glossop (1989), Frank Helmuth (1989), Charles R. L. Power (1989), Prof. James Fonseca (1990), William R. Harmon (1990), David Wolff (1990), Ellen Eddy (1991), Nels M. Nelson (1991), William H. Schulze (1991)

Commissioners: William R. Harmon (CO), D. Holland-Kaupp (Correspondence Courses), J. Gildemeister (Legislative Affairs), R. Kent Jones (Science & Technology), Jim Deer (Tape Service), Lucy Harmon (Travel Affairs), J. B. Massey (Wills and Gifting), Ellie Stein (Women's Affairs), Dr. James Cool (Youth Affairs), Dr. Julius Manson (United Nations), John B. Massey, William H. Schulze and Sidney V. Steinberg (Kapitala Fondusa Komitato)

Director, ELNA CO: Mark Stephens

ELNA Archivist: Hal Dreyer

Any member wishing to assist in the work of any of the above named commissions or committees should communicate with the member(s) shown.

ELNA Dues for 1989

Regular	\$25.00
Family	\$37.50
Youth (under 26)	\$18.00
Senior (65+)	\$15.00
Sustaining	\$50.00
Life	\$500.00

Dues are for the calendar year and are tax-deductible.

UEA dues 1989

Member-Guidebook only(MG)	\$ 7.00
Member-Yearbook only (MJ)	\$16.00
Member-Subscriber (MA)	\$39.00
Societo Zarmenhoft (additional)	\$78.00
Subscription only to Esperanto	\$23.00
Subscription only to Kontakto	\$12.00
Life Membership in UEA	\$975.00

Send payments for UEA memberships or subscriptions to ELNA/UEA, Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Make all checks payable to ELNA.

MOVING? DON'T LEAVE ESPERANTO BEHIND! If you have moved recently or are planning to move in the near future, don't forget to send a change-of-address card to the ELNA Central Office, Box 1129, El Cerrito CA 94530. This will assure your continued receipt of the Newsletter and other information. If you don't have a stamp handy, give the CO a call at (415) 653-0998. Thanks!

DEADLINE FOR MATERIAL FOR THE MAY-JUNE issue of the ELNA Newsletter is June 25, 1989!

ELNA Newsletter
Volume 25, No. 2
ISSN 0030-5065
Esperanto League for North America,
Inc.
P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530
Telephone: (415) 653-0998
Editor: Don Harlow
Typesetting & Graphic Design:
Gregory V. Wasson